

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 20 Eberswalde 1989-07-20

---

## 1. Pri nia terminologia kaj vortora laboroj

### 1.1. Atingita stadio de la laboro

Ĝis nun ni eldonis la difino-proponojn de 1008 nocioj kaj kolektis ekvivalentojn por etnolingvoj. Laŭ la lasta stato nun kunlaborantoj de 13 etnolingvoj liveras proponojn. Mankas reprezentantoj por la angla, hispana, romana, kaj finna, por kiuj ni povis kolekti kelkajn ekvivalentojn el ekzistantajn forstaj vortaroj.

La .1 version ni eldonis ĝis numero 0799 kaj la sekvontajn ni nun preparas. Intertempe ni intencas komenci la eldonon de la .2-versio. La sinsekvo estos denove laŭ niaj labornumeroj.

Sur la laste eldonitaj slipoj tiu ĉi labornumero staras nur post okcifera numero. La klarigon pri nova numero vi trovas en la aldono de tiu ĉi FI-numero. Bonvolu informi nin pri via opinio al tiu propono. La eldono de la .3-versio estu ordigita laŭ tiu sistema sinsekvo.

La listoj pri la kvarciferaj Oksford-numeroj (bibliografia indikaro) estas tradukataj de I. Ullrichkaj publikigitaj kiel aldonoj de FI.

### 1.2. Pri la preparo de la .2-versio

Dum la prilaborado de la .2-versio ni atingi pli altan kvaliton de la rezulto. , Bonvolu atenti la sekvontajn rimarkojn, kvankam pri kelkaj el ĝi ni jam kelkfoje informis.

#### 1.2.1. Kun la estonta eldono de forsta terminaro/vortaro ni ĉiuj transprenas altan respondecon. Tiu ĉi respondeco rezultas el la respondeco de ĉiu unuopa por certa parto de la rezulto.

La Malgranda Terminologia Komisiono sub la gvido de I. Ullrich responsas pri la proponoj en Esperanto. Por la etnolingvaj ekvivalentoj la respondecon havas la respektivaj kunlaborantoj. Se ekzistas kelkaj kunlaborantoj por unu lingvo, ili interkonsentiĝu pri unu responsulo, kiu resumu la ekvivalentojn de sia lingvo kaj resendu la akordigitan korektitan liston al Eberswalde.

Kiel propono, nur kiel propono, ni substrekas la nomon de la responsulo:

de: d-ro SIMON, Karl-Hermann  
 PACHTER, Johann Andreas  
 PETERS, Jürgen  
 ULLRICH, Ingward

d-ro WECKWERTH, Horst  
 fr: prof-o DINARD, Andre  
 MEIER, Liliane

ru DANILIN, Igor  
 KOVALEVA, Valentina  
 SMILDZINS, Julio

bg: MARINOV, Boris Dimitrov  
 ALEKSANDROVA, Milka

cs: MOUDRY, Jindřich  
 BERGER, Otto  
 VÁŇA, Otto  
 sk: VÁŇA, Otto  
 MOUDRY, Jindřich  
 po: PANKA, Stefan  
 BUŁKA, Maria  
 PACHOLCZYK, Karol  
 WOLNIARSKI, Zbigniew  
 sv: RIBERS, Ulf  
 MARKHEDEN, Malte  
 hu: OROSZI, Sandor  
 BARASEVICH, Antal  
 TURZA, Tibor  
 no: prof-o BØRSET, Ola  
 it: BARBANA, Luigi  
 tr: d-ro YILDIRIM, Meliksah  
 nl: KNOCKAERT, Cyreen  
 pt: SEREJO, Edmilson

Ni petas, ke la samlingvanoj kunlaboru, kiel la Hungaroj kun sia responsulo S. Oroszi.

1.2.2. Provu, ĉu ĉiu proponita ekvivalento konformas kun la difino. – Ankaŭ elĉerpaĵoj el vortaroj povas esti dubindaj. – Ekvivalentoj, kiujn malakceptis aŭ pridubis unu kunlaboranto (sen aldonita kaŭzo), ricevis demandosignon. En kelkaj kasoĵ ekvivalento estis transtrekita fare de kunlaboranto kaj alia kolego substrekis ĝin kiel preferinda.

Oni povas uzi ankaŭ signojn post esprimo:

>< en vasta aŭ malvasta senco ol la difino

# preskaŭ sinonimo

+ arkaika aŭ arkaikiĝanta esprimo

[ ] esprimo estas limigita al en krampoj indikita teritorio

En rondaj krampoj ( ) nur staras literoj aŭ vortoj, kiujn oni povas laŭdezire ellasi. Rondaj krampoj ne enhavu klarigojn.

1.2.3. Se mankas termino por nocio, tiam uzu priskribon kaj/aŭ elektu esprimon kun la signoj #;> aŭ <.

1.2.4. Provu ĉu la vortformo (ekz. substantivo, verbo) konformas kun la difino ( kaj la lasta cifero de la klasifikad-numero).

1.2.5. Ekzistas lingvoj, kiuj postulas indikon de gramatika genro. Bonvolu kompletigu la indikon.

1.2.6. Konsideru, ke la pli malfrua ordigo en la unuopaj lingvoj estos farata laŭ la alfabeto vico de la unua vorto ĉe multvortaj esprimoj. La decida vorto staru je la unua loko kiel ekz. “arbarero, elita”. La sencoplenta ordigo postulas starigi apudajn vortojn malantaŭen. Malantaŭ la komo do ĉiam staras vorto(j), kiu(j) staras en normalaj frazoj antaŭ la gvidvorto.

- 1.2.7. Semikolo ĉiam disigas ekvivalentojn (por unu difino, nocio).
- 1.2.8. Kiel ni vicigu la ekvivalentojn? Eblus vicigi laŭ alfabeto.  
Ni proponas la vicigon laŭ la prefero rilate al la apliko. Se ekzistas internacia aŭ ŝtata normigita termino, ĝi havu unuan lokon. La ekvivalentoj, kiuj estas plej malmulte rekomendindaj, havu la lastan lokon (eventuale en rondaj krampoj laŭ la propono de J. Moudry). Tia agadmaniero estos la pli malfacila, ĉar la decido estos ofte komplika kaj la ĝisnunan sinsekvon ni ofte devas ŝanĝi en la elektronika storno, sed por la estontaj uzantoj rezultigas avantaĝon.
- 1.2.9. Ni atendigas la hungarajn kunlaborantojn, ke ekzistas kelkaj ekvivalentoj speziale el DF, ĉe kiuj ne estas indikita, kiujn vortparton oni (ankaŭ komputilo) ripetu. Per vertikala streko kaj ripeto-signo oni devas korekti tiujn kazojn.
- 1.2.10. Dum la prilaborado de nocioj ree kaj ree montriĝas la neceso kunmeti numerojn – ĉar nocioj estas identaj – aŭ dispartigi nociojn.  
La enhavon de 0426 ni kunmetis kun 0291.
- 1.2.11. Ni intencas multobligi la .2-version per komputilo skribitaj listoj. La kvalito de la pli malmultekostaj hektografo-kopioj ne kontentigas. La malnova organisad-aŭtomato ofte transsaltas literojn.
- 1.2.12. Kun ĝojo ni povas informi, ke dum la prilaborado de la .2-version, la artikoloj estos kompletigataj per la portugaliaj ekvivalentoj fare de s-ano E. A. Serejo.
2. Informo pri kunveno de la estraro de IFRE. Okaze de JES (Jarmezaj Esperantista Semajnfino 1989) en Leipzig la estraro de IFRE kunsidis. Partoprenis B. D. Marinov, D-ro Simon kaj I. Ullrich. Estis al J. Pachter maleble veni.
- 2.1. Ni apliku la proponon rilate klasifikadon de forstaj nocioj (vd. aldono n-ro 4). La estraro dankas al I. Ullrich pro la traduko de la Oksford-sistemo (kvarcifera). Ni jam komencas publikigi ĝin en la nuna FI, kvankam ni estas konvinkitaj, ke ni revizios kelkajn terminojn dum nia terminografia laboro.  
Tiu ĉi traduko estas samtempe la komenco de pli malfrua traduko de la tuta Oksford-sistemo.
- 2.2. Ni preparu publicaĵon pri nia terminografia/vortara laboro por la sekvonta IUFRO-kongreso en la jaro 1991.
- 2.3. Kvankam la preparo de la unua parto de la vortaro dominos niajn nunajn vortarajn agadojn, ni jam komencu elekti la nociojn, kiujn enhavu la dua parto. Proponoj estas bonvenaj.
- 2.4. Ni publikigu en FI du prelegojn, prezentitajn dum JES: I. Ullrich: Pri la forsta fonduso en GDR.  
K.-H. Simon: Ĉu la laiko povas helpi por vivteni la arbaron?  
La unua jam estas publikigita en "Tutmondaj Sciencoj k Teknikoj".
3. Adresaro

- 3.1. Kompletigante la liston de la IFRE-anoj en FI 2,3,4,13,17,18 ni aldonas la sekvantajn adresojn. Kelkaj de gesinjoroj estas multjaraj IFRE-anoj, sed mankas en nia adresaro.

ALEKSANDROVA, Milka, gorsko stopanstvo, MÂGLIŽ, BG-6180

BARASEVICH, Antal, Hősöktera 24/2, Csákberény, H-8073

ČERNIKOV, Viktor Petrovič, str. 30letPobedy 54-82, ČERKASY, SU-257024

DANILIN, Igor, Institut lesa i drevesini im.V. N. Sukačeva, KRASNOJARSK, SU- 660036

MARKHEDEN, Malte, Sjøhaga, STRÖMSNÄSBRUK, s-28700

PANKA, Stefan, Makarenkostr. 37, FINOWFURT, DDR-1303

RIBERS, Ulf, Norra Freberga, MOTALA, S-59190

SEREJO, Edmilson Lima, Rosenau 7, FREIBURG i. Br., D-7800

SIMON, Ingeborg, C.-v.-Ossietzkyst. 21, EBERSWALDE-FINOW, DDR-1300

SÎRBU, Ion, Bulv. Lenin92, Sc.C.Ap.8., BRASOV, RO-2200

SULŻYCKI, Janusz, Box 453Station "A", HAMILTON, Ontario L8N 3H8, Kanado

TURZA, Tibor, Akácfa u. 37. TATA, H-2890

- 3.2. Kiel ne-esperantistoj estas responsaj kunlaborantoj (ni ne povas anonci ĉi tie ĉiujn aktivulojn de nia terminolografia/vortara laboro).

prof-o BØRSET, Ola, Institutt for Skogskjøtsel, Norges Landbrakshøgskole Boks 42, ÅS-NLH , N\_1432

prof-o DINARD, A., 16, bd Sébastopol, REHNES, F\_35000

d-ro YILDIRIM, Meliksah, Mille Prodükivite Merkez, Meşrutiyet Cad. 162/4, Şişhane, Beyoğlu, ISTANBUL, Turkio

### **Aldonaĵoj:**

Nr. 1: – Afiŝo: Fakvortaro pri Forstmestrumado

Nr. 2: – Alfiŝo: Skemo de la laboristemo

Nr.3: – SIMON, K.-H.; STEINERT, U.; ULLRICH, I.: Pri la tekstprilaborado kaj komunikado dum la preparo de multlingva forstfaka vortaro

Nr. 4: – SIMON, K.-H.; ULLRICH, U.: Proponoj al klasifikado de terminaro pen la sfero de la forstmastrumado (germane kaj Esperante)

Nr. 5: – Decimal-klasifikado pri la forsta fako laŭ la Oksford-sistemo. p. 0 –17

Nr.6: – Listo de esperantlingvaj forst-terminoj ĝis nun proponitaj de Malgranda Terminologia Komisiono (MTK) de IFRE (2-a daŭrigo)

### **Aldonaĵo 3**

SIMON, K.- H.; STEINERT U.; Ullrich, I.

#### **Pri la tekstprilaborado kaj komunikado dum la preparo de multilingva forstfaka vortaro**

0. Ni intencas prezenti kelkajn spertojn, kiujn kolektis la Internacia Forstista Rondo Esperantlingva (IFRE) dum sia terminografika kaj vortara laboroj. Ĝis nun ni ne konsideris tiujn spertojn komunikindaj, sed montriĝis, ke lastatempe kreskis la intereso pri terminologio. Pliaj grupoj komencas okupiĝi pri esperantlingva fakvortara trezoro kaj interesiĝas pri niaj labormetodoj.

Unu el la plej gravaj spertoj de nia agado rilatas la kooperadon kun partneroj. Al la esperantlingvaj fakgrupoj ofte mankas potencoj materialaj, instalaĵaj, financaj kaj ankaŭ spiritaj. La forstscienco estas fako, kiu ne havas tiom multe da kompetentuloj kiel ekzemple la agrikulturaj sciencoj. Tial estas kompreneble, ke IFRE estas malgranda grupo. Des pli grave estis kaj estas por ni alianciĝi kun kaj stataj kaj sociaj kaj fakorganizaĵaj kaj entreprenaj institucioj. Surbaze de reciprokaj interesoj ni atingis la kunlaboron de kompetentuloj kaj la eblecon, utiligi raciigajn instalaĵojn.

Kunligita kun tia sperto estas alia tre grava: Ni estu flekseblaj kaj uzu ĉiutempe ekestantajn okazojn. Kompreneble tio ne signifas oportunismo, forlasi bazajn principojn.

Dekomence (en la jaro 1981) ni samopiniis pri tio, ke ni ne perdu tempon per elprovado de la plei bona labormetodo. La tempo por la kolektado de fakvort-trezoro estis tro maturiĝinta. Kiel unu el niaj kvin laborprincipoj ni postulis plian kompletigon kaj raciigon de la metodoj dum la laboro. Tiel pli kaj pli efektiviĝis niaj agadoj.

1. Ni raportos pri du cefaj sekcioj de la raciigo de niaj agadoj: Unue pri la tekstprilaborado, due pri la interŝango de la tekstoj kaj informoj inter la kunlaborantoj.
  - 1.1. Unu el la plej gravaj demando, kiujn ni devis decidi je la komenco de la laboro estis: Kiel ni povas raciigi la skribadon de vortaraj tekstoj, kiujn ja devas trairi multajn prilaborad-ŝtupojn. La solida fiksado de la skribitaj literoj kaj la eventuala neceso de ŝango de unuopaj literoj kaj la kompletigo postulis maŝinlegeblajn datumkonservilojn anstataŭ ripetitan uzadon de skribmaŝinoj. La rapidega evoluo sur la kampo de komputiloj kaj komputado dum la lastaj jaroj tute pravigis nian tiaman decidon. Hodiaŭ jam ne estas imageble komenci tian laboron per skribmaŝino.
  - 1.2. La apliko de maŝinoj por legado kaj prilaborado de niaj tekstoj postulis determinitan ordon de la enhavo. Niaj tekstoj konsistas el unuopaj nocioj kun iliaj terminoj. La nocioj, t.e. la artikoloj, ricevis sinsekvajn numerojn. La subdivido de ĉiu artikolo laŭ la ekvivalentoj en la unuopaj lingvoj estas realigitaj per respektivaj lingvo-mallongigoj. Je la komenco de iu ajn linio en la artikolo devas troviĝi nur lingvo-mallongigo (aŭ interspaco). – Tio estas grava por pli malfruan automatigan ordigon. – La mallongigoj konformas al la internacia normo “iso r 639 Language symbols”.
  - 1.3. La indiko pri la fontoj de respektivaj terminoj/ekvivalentoj ĉiam staras inter du oblikvaj strekoj. Tiamaniera unusignifa markado de fontoj facile ebligas regi la ellason de tiuj fontoj, Por ŝpari frapojn sur la klavaro kaj spacon en la artikoloj ni uzas nur mallongigojn, t.e. du aŭ tri literojn. Ni eldonas specialan bibliografion, kiu enhavas tiujn mallongigojn. Ili estas indikitaj majuskle. La nepublicitajn proponojn de la kunlaborantoj ni markas per minuskoj.
  - 1.4. Speciala problemo estis: Kiel skribi la literojn de diversaj lingvoj. En landoj kun eŭropaj lingvoj la klavaroj de komputiloj ĝenerale havas nur latinajn literojn. Sed multe da lingvoj havas literojn, kiuj estas kompletigitaj per diakritaj signoj. – Intertempe ekz. la funkciadsistemo CPS havas la eblecon skribi per IBMC ODE diversajn specialajn literojn, sed ne ĉiujn, kiujn ni

bezonas. – Ni ne intencis rezigni pri la solida unusenca fiksado de la tekstoj sur maŝinlegeblaj datenaj konserviloj. Tial ni kodis la diakritajn signojn kaj relatinajn literojn per nombroj antaŭ la literoj:

ˆ1	˜5	-9	<13
˘2	˘6	ı10	Ł14L
˙3	˙7	°11	Œ15o
˘4	˘8	>12	ß16s
ı17i (i sen punkto)			

La konsekvenco de tia agamano estis: En la tekstoj ciferoj, escepte de la kapnumeroj kaj la kodociferoj, estas ne permesataj. Por la kirilaj literoj ni uzas transliteradon laŭ normo 1362-78 de Konsilio de Reciproka Ekonomia Helpo. Ĉe tio unu litero estas transliterata per unu signo. Tiel aŭtomata retrotransliterado estos malfacila.

- 1.5. Por la maŝinteknika realigo de la tekstprilaborado ni uzas diversajn variantojn. La unua disponebla ilo estis organizad-aŭtomato, t.e. kvazaŭ elektra skribmaŝino kunligita kun ŝtancilo kaj legilo por trubendo. La korektado necesigas maŝinan ŝtancadon de nova bendo. Ĉe la korektota loko oni haltigas la kuradon de la bendo kaj intermetas la korektotaĵon. Pli malfrue ni komencis uzi komputilon I 1027 kun diskostoro. La prilaborado de tekstoj ĉe terminaloj helpe de la tekstprogramo EDI tre rapidigis kaj faciligis la laboron. Ĉiuj artikoloj estis storataj en biblioteko LIBRARY.UNI. Por zorga kontrolo de teksto oni bezonas la tekston sur papero. Tiun ĉi oni ricevas per printilo ĉe la terminalo, iom longedaŭra procedo. Sed se oni prilaboras tekston ĉe unu terminalo kaj printas ĉe dua, oni ne perdas tempon. – Bedaŭrinde la rapidprintilo liveras nur majusklojn, kiuj ne sufiĉas ĉi-okaze. – La disvastigo de personkomputiloj kaj de laborlokaj komputiloj nun ebligas ankaŭ de tempo al tempo uzi tiajn komputilojn, kiuj storas la datumojn sur disketoj. Tiaj komputiloj ebligas uzi redaktajn programojn kiel ekz. WORDSTAR. Do, ni uzas tri diversajn komputil-variantojn kun diversaj storfomoj laŭ la disponigo fare de posetantaj institucioj kaj laŭ la libertempo de la kunlaborantaj esperantistoj. Kiel ĉefan datumkonservilon ni utiligas la diskostoron de I102F-instalaĵo. La datumoj, registritaj sur trubendo per organizad-aŭtomato aŭ sur disketo per personkomputilo, estas poste enigitaj ĉiam en diskostoron de I102F. Inverse ni transprenas tekstojn el tiu “cefa” storo en disketojn por prilaborado per personkomputilo.
2. Por la terminografia/vortara laboro la kunlaborado de esperantistoj – kaj ne-esperantistoj – el diversaj lingvaj sferoj havas grandan signifon kaj sekve ankaŭ tio validas por racia formo de la interŝanĝo de informoj.
- 2.1. Ni certigas la komunikadon inter la kunlaborantoj per kvar rimedoj:
- 2.1.1. Forstista Informilo  
Per ĝi ni komunikadas al ĉiuj esperantistoj pri demandoj de la terminografia/vortara laboro, ĝeneralaj fakaj problemoj kaj respektivaj aranĝoj.
- 2.1.2. Bibliografio de Arbarmastrumada Literaturo

Ĝi entenu ĉiujn forstajn Esperanto-lingvajn publicaĵojn kaj tiujn, kiuj estas uzataj dum la terminografia/vortara laboro.

### 2.1.3. Slipoj

Ĉiu artikolo, t.e. difino kun terminoj en diversaj lingvoj, estas skribita sur slipo (A5-altformato). Slipo povas enteni la tutan artikolon aŭ nur partojn de ĝi.

### 2.1.4. Vortlistoj

Ili nur entenas la ordigitajn laŭ numeroj Esperanto-lingvajn termino-propojn aŭ/kaj proponojn de unu/du etnolingvoj, kiujn la koncerna kunlaboranto prilaboras.

## 2.2. La multobligo-maniero de la kvar diversaj inform-rimedoj dependas de

- la bezonataj alfabeto/literoj
- la bezonta kvanto de ekzempleroj
- la disponeblaj instalaĵoj
- la disponeblaj komputil-programoj
- la disponeblaj materialoj (spcialaj paperspecoj ktp.).

Laŭprincipe ni uzas nun kvin diversajn multoblig-metodojn:

2.2.1 La plej multaj kunlaborantoj faras per skribmaŝino karbokopiojn de la vortlistoj. Tiuj kunlaborantoj havas skribmaŝinojn por la alfabeto de siaj lingvoj. Necesas nur malmultaj kopioj.

2.2.2. Per stenciloj (vaksaj matricoj) kaj hektografo ni multobligis kelkfoje la "Forstistan Informilon" (FI) kaj partojn de la "Bibliografio". Skribmaŝino ebligas skribi la Esperanto-alfabeton, kuin ni bezonas por FI kaj por Bibliografio. Estas facile produkti cent ekzemplerojn, sed malfacile akiri stencilojn.

2.2.3. La printilo ĉe terminalo ebligas printi la enhavon de la storo, sed oni povas ricevi dum unu printprocedo nur unu aŭ du ekzemplerojn. Tio rilatas la artikolojn, la enhavon de slipoj. La aŭtomata printado evitas printerojn, sed postulas multe da valora labortempo de la komputilo. – Rapidprintilo por majuskloj kaj minuskloj ne estas disponebla. – Krome, tio postulas specialan paperon. Do, ni printas en tia maniero nur eltiraĵojn de la artikoloj. Ekzemple la du slovakoj kunlaborantoj bezonas el la dua kaj tria versio de la slipoj nur la Esperantan, slovakon kaj ĉeĥan partojn de la artikoloj. Helpe de speciala programo la komputilo faras automate tiajn eltirajojn.

2.2.4. Alia metodo – en GDR nomita ORMIG – ebligas "reprodukti tekstojn, tajpitajn sur speciala papero, uzante anilinfarban kopi-papero, kiun oni dorsflanke metas malantaŭ la skribfoliojn; ĉi tiu folio akceptas spegulbildon de la skribaĵo"/PIV/, de kiu la hektografo permasas kopii kelkdedon da reproduktaĵoj. Tiun metodon ni ofte uzas por kopii FI-n, Bibliografion kaj slipojn. Por kopii slipojn ni iras la sekvan vojon: La elsendotaj artikoloj – aŭ partoj de ili – estas indikitaj per terminalo de komputilo I102F. Poste, helpe de speciala programo, estas ŝtancata trubendo de la indikitaj tekstoj. Tiun ĉi bendon ni metas en la legilon de organizad-aŭtomato, kiu skribas la artikolojn sur ORMIG-foliojn. Nur poste ni povas produkti per hektografo la necesajn ekzemplerojn. Estas iom malsimpla sed tre racia vojo por fari senerarajn malmultekostajn kopiojn de la artikoloj.

- 2.2.5. Per kserografi-metodo multoblige originalon estas kompreneble la plej agraba agmaniero. Sed nur maltofte ni disponas pri tiu ebleco. Ankaŭ la kostoj estas pli altaj ol por ORMIG-kopioj.
3. En tiu artikolo ni koncentriĝis sur la raciigo de praktikaj, teknikaj laboroj, sed tia baza decido kiel la kombino de terminografia kaj vortara laboroj havas pli gravan raciigan efikon: La kunlaborantoj disponas, helpe de la terminoj el diversaj lingvoj, pri bona fundamento elekti kaj decidi pri konvena Esperanto-lingva termino. Ankaŭ la rondo de eblaj uzantoj de tiu fakvortaro estos pli ampleksa ol ĉe ne multlingva fakvortaro.

Eble ni povis montri, ke esperantistoj havas multajn eblecojn efektivigi la laboron, se ili agas flekseble kaj alianciĝas kun fortaj institucioj.

Gloso: ŝtanci – truiĝi paperbendon tiel, ke estiĝas trubendo kiel maŝinlegebla datunkonservilo.

#### **Aldonaĵo 4**

Simon, K.-H.; Ullrich, I.; Pluquet, E  
Betriebssektion der Kammer der Technik im Institut für Forstwissenschaften  
Eberswalde

#### **Vorschlag zu Klassifizierung von Termini auf dem Gebiet des Forstwesens (Propono pri la klasifikado de terminoj en la sfero de la forsta fako)**

Seit einigen Jahren arbeitet am Institut für Forstwissenschaften Eberswalde die Fachsektion „Forstterminologie“ der Betriebssektion der Kammer der Technik in enger Verbindung mit der Fachgruppe „Forstwirtschaft“ des Esperantoverbandes an der Zusammenstellung eines mehrsprachigen Wörterbuches des Forstwesens auf der Basis von Begriffsdefinitionen. Damit wird gleichzeitig die Grundlage für die Bildung und Normung von Fachtermini geschaffen.

In der DDR gibt es z. Z. kein allgemein verbindliches Dokument, in dem die Gesamtheit der forstlichen Fachtermini enthalten ist. Die bisher definierten forstlichen Fachtermini sind nur in verstreuter Form in den verschiedenen Standards vorhanden. Es existiert also nicht wie z. B. in der CSSR eine Staatsnorm „ Terminologie der Waldwirtschaft CSN 48“ (1963), wobei Terminologie hier im Sinne von Zusammenstellung der Termini aufzufassen ist. Die Einordnung der Termini in ein numerisches System wie z. B. ein dezimales oder ein oktales System ist dabei nicht gegeben. Die CSSR-Norm gliedert die Begriffe in vier Fachdisziplinen und insgesamt in 19 Untergruppen und nummeriert 811 Hauptbegriffe fortlaufend. Weitere ca. 200 Unterbegriffe, die in dieser Norm eingeordnet sind, bleiben ohne Nummer.

In der von der IUFRO bestätigten TERMINOLOGY (1971) in englischer Sprache, die inzwischen in einige andere Sprachen übersetzt wurde, richtet sich die zahlenmäßige Ordnung nach der alphabetischen Ordnung der 5150 wichtigsten Termini. Zusammen mit den untergeordneten Begriffen enthält diese Termini-Zusammenstellung insgesamt 6807 Nummern. Eine derartige Ordnung lässt also keine Einführung fehlender Termini zu. Erschwert ist außerdem die Terminusbildung entsprechend den Grundsätzen der Terminologie, wie sie als Wissenschaft der Terminusbildung von WÜSTER 1931 begründet wurde.



Für die systematische Ordnung der Forsttermini schlagen wir ein Dezimalsystem vor, das aus dem „Oxford-System der Dezimal-Klassifikation für Forstwesen“ aufbaut. Bekanntlich gilt das „Oxford-System“ offiziell für die Klassifizierung von Informationsquellen zur Untersetzung des Titels „634.9 Forstwirtschaft“ der Allgemeinen Dezimal-Klassifikation. Da diese Systeme für die Charakterisierung von Literatur geschaffen wurde, ist verständlich, dass sie nicht ohne weiteres für die Klassifizierung von Fachtermini geeignet sind.

Wir empfehlen für die Klassifizierung der forstlichen Fachtermini die Ziffernfolge des „Oxford-Systems“ zu nutzen und zwar bis zur vierten Ziffernstelle. So enthält z. B. der Terminus „Mittelwald“ entsprechen dem „Oxford-System“ die Ziffernfolge „222.1“. Fehlende Ziffern z. B. für „2 Waldbau“ werden durch Nullen bis auf vier Ziffern aufgefüllt, also „200.0 Waldbau“.

Alle Begriffe, die zu einer vierziffrigen Nummer gehören, werden fortlaufend zweiziffrig nummeriert. So bekommt der Terminus „Mittelwald“ als erster Begriff unter der Nummer „222.1“ eine Ziffernfolge „222.1.01“, ein zweiter Terminus „Laßbaum“ die Folge „222.1.02“.

Die nunmehr sechsziffrige Nummer wird durch weitere Ziffern ergänzt, die einmal den allgemeinen Sinn der Begriffe charakterisieren (7. Ziffer) und zum anderen die Wortart (8. Ziffer). Auf diese Weise stehen vom Sinn her (und gegebenenfalls vom Wortstamm her) gleichartige und ähnliche Termini im Klassifizierungssystem dicht zusammen. Für die sieben Ziffern gilt folgender Schlüssel:

- |   |                                |
|---|--------------------------------|
| 1 | Person                         |
| 2 | Objekt                         |
| 3 | Werkzeug, Instrument, Maschine |
| 4 | Ort, Raum, Fläche              |
| 5 | Eigenschaft, Zustand           |
| 6 | Abstraktum                     |
| 7 | Handlung, Vorgang              |
| 8 | Maß, Wert-, Mengenangabe       |
| 9 | Gesamtheit, (Kollektivplural)  |

Für die 8. Ziffer gilt der Schlüssel:

- |   |            |
|---|------------|
| 0 | Substantiv |
| 1 | Adjektiv   |
| 2 | Verb       |

Der Terminus „Mittelwald“ erhält also die Ziffernfolge

„222.1.01.20“  
 | | | | „Oxford-Ziffer“  
 | | | | 1. Terminus  
 | | | | Objekt  
 | | | | Substantiv

Der Terminus „stratifizieren“ hat die Ziffernfolge

„232.3.14.72“  
 | | | | „Oxford-Ziffer“  
 | | | | 14. Terminus  
 | | | | Handlung  
 | | | | Verb

Die letzten zwei Ziffern besitzen eine gewisse Redundanz zum Inhalt der Definition. Dies ist ein Vorteil, weil es in einigen Ethnosprachen (ungeplant gewachsene Nationalsprachen) manchmal nicht leicht ist zu entscheiden, ob es sich um eine Handlung oder um ein Objekt handelt.

Die vorgeschlagene achtziffrige Klassifikation besitzt außerdem den Vorteil, für eine zukünftige elektronische Datenverarbeitung unmittelbar geeignet zu sein, da sie mit acht Zeichen der möglichen Dateibenennung entspricht. Dadurch kann ohne besonderen Programmaufwand die zahlenmäßige Ordnung der Termini mit einem Dienstprogramm erfolgen.

#### Literatur

Terminology of Forest Science, Technology Practice and Products.

Ed. Ford-Robertson, F.C.; Society of American Foresters Washington D. C. 1971

Wüster, E. : Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik. VDI-Verlag, Berlin 1931

**fake kaj lingve reviziis: Ingward Ullrich**